

Ĉu vi sciis tion ?

De 1993, la 22^a de marto estas la tutmonda tago pri akvo. Akvo troviĝas ĉie ĉirkaŭ ni. Tamen, ĝi mankas al preskaŭ unu el kvin loĝantoj de la planedo. Do, ni estu zorgemaj pri akvo, ĉar ĝi estas vivnecesa.

La potenca akvo de la riveregoj : 6516 km estas la longo de la riverego Amazono, la plej longa en la mondo, en suda Ameriko. Amazono estas la plej potenca riverego en la mondo. Ĝi flu-transportas de 70 ĝis 200 milionojn da litroj de akvo en sekundo. La fluokvanto de la rivero Loire ankaŭ estas varia, sed ne superas 7 milionojn da litroj en sekundo.

La malŝparita kranakvo : Ĉiu usonano uzas, ĉiutage, 360 litrojn da kranakvo. Franco uzas 160 litrojn, ĉiutage. 1,1 miliardo da personoj tra la mondo ne disponas trinkeblan akvon.

La kaŝita akvo de la objektoj : 50 litroj estas la kvanto da akvo necesa por fabriki unu kilogramon da sukero. 120 litroj estas necesaj por unu kilogramo da tinkturita ŝtofo, kaj 10 000 por fari aŭtomobilon. Tiu akvo estas uzata por lavi, miksi kaj malvarmigi la materialojn.

La akvo de soifaj plantoj (ne dromaderaj plantoj !): por produkti unu kilogramon da greno, maizo bezonas 330 litrojn da akvo. Arbo kapablas ĉerpi el la grundo 200 litrojn da akvo dum nur unu tago, somere. La plantoj ne stokas tiun tutan kvanton da akvo, kiu vaporiĝas en aeron je la nivelo de iliaj folioj.

La vivesenca akvo de la korpo : 70-kilogramo korpo de plenkreskulo entenas 45 litrojn da akvo. Ju pli ni estas junaj, des pli nia korpo entenas akvon. Tiel, ĉe novnaskito, akvo konstituas 75 % de la korpo, kaj 55 % de la korpo de maljunulo. Akvo en la korpo, averaĝe, renoviĝas ĉiun tridekan tagon.

La luksa enboteligita akvo : Ĉiujare, italo konsumas 181 litrojn da enboteligita akvo. Franco konsumas 145 litrojn ĉiujare. Tiu enboteligita akvo pli kostas de 200 ĝis 300 fojoj ol kranakvo.

La kaprica akvo de pluvoj : 887mm estas la alto de pluvo, kiu averaĝe falas ĉiujare, en Francio. Tio egalas al al 885 akvolitroj sur 1 kvadratmetro. Sed en 2005, seka jaro, pluvis nur 458 mm sur ĉiu kvadratmetro de Bel-insulo. Sauda Arabio, kun senpluva klimato, ricevas malpli ol 100 mm da pluvo ĉiujare.

La sala akvo de la Tero : la averaĝa kvanto da salo en la marakvo estas 35 gramoj. 97,5 % da akvo sur tero estas sala. Kaj preskaŭ la tuta sensala akvo estas kaptita de la polusglaĉeroj. Nur sensignifa parto de akvo - 0,65 % - estas trovebla el pluvo, riveroj kaj grundo.

Resume, ni respektu akvon !

- ◆ Ni fermu la kranojn
- ◆ Ni prenu rapidan duŝon anstataŭ banon
- ◆ Ni riparu la akvo-forĝutadojn de akvopeliloj
- ◆ Ni ne ĵetu la kemiaĵojn aŭ medikamentojn en lavkuvon
- ◆ Ni kolektu pluvakvon por akvumi.

Artikolo publikigita en Ouest-France,
merkredon, la 22^{an} de marto 2006.

Esperantigita de Liliane, Christiane, Françoise G.,
Françoise M., Louis, Jackie.

Vous le saviez ? ...

Depuis 1993, le 22 mars, c'est la **journée mondiale de l'eau**. L'eau se trouve partout autour de nous. Pourtant, près d'un habitant de la planète sur cinq en manque. Alors, prenons soin d'elle, car l'eau est vitale.

L'eau puissante des fleuves : 6516 km, c'est la longueur du plus long fleuve du monde, l'Amazon, en Amérique du Sud. L'Amazon est le plus puissant fleuve du monde. Il charrie 70 à 200 millions de litres d'eau par seconde. Le débit de la Loire est lui aussi variable, mais il ne dépasse pas 7 millions de litres par seconde.

L'eau gaspillée du robinet : 360 litres, c'est la quantité d'eau du robinet qu'utilise chaque habitant des États-Unis par jour. Un Français en fait couler 160 litres par jour. Dans le monde, 1,1 milliard de personnes ne disposent pas d'eau potable.

L'eau cachée des objets : 50 litres, c'est la quantité d'eau qu'il faut pour fabriquer un kilo de sucre. Il en faut 120 pour un kilo de tissu teint et 10 000 pour une voiture. Cette eau sert à laver, à mélanger et à refroidir les matériaux.

L'eau des plantes assoiffées : 330 litres c'est la quantité d'eau dont on a besoin le maïs pour produire 1 kilo de grain. Un arbre peut puiser dans le sol 200 litres d'eau en une seule journée d'été. Les plantes ne stockent pas toute cette eau, elles l'évaporent dans l'air au niveau de leurs feuilles.

L'eau précieuse du corps : 45 litres, c'est la quantité d'eau contenue dans le corps d'un adulte de 70 kilos. Plus on est jeune et plus notre corps contient d'eau. Ainsi l'eau représente 75 % du poids d'un nouveau-né et 55 % de celui d'un vieillard. L'eau du corps se renouvelle en moyenne tous les 30 jours.

L'eau luxueuse en bouteille : 181 litres, c'est la quantité d'eau en bouteille consommée par un Italien par an. Un Français en consomme 145 litres par an. Cette eau en bouteille coûte 200 à 300 fois plus cher que l'eau du robinet.

L'eau capricieuse des pluies : 887 mm, c'est la hauteur de pluie qui tombe en moyenne chaque année en France. Cela représente 885 litres d'eau par mètre carré. Mais en 2005, année de sécheresse, il n'est tombé que 458 mm de pluie à Belle-Île-en-Mer. L'Arabie Saoudite, au climat aride, reçoit moins de 100 mm de pluie par an.

L'eau salée de la Terre : 35 grammes, c'est la quantité moyenne de sel dans l'eau de mer. 97,5 % de l'eau de la terre est salée. Et presque toute l'eau douce est prisonnière des glaciers des pôles. Seule une infime partie de l'eau - 0,65% - est accessible dans la pluie, les rivières et le sol.

En résumé : respectons l'eau !

- ◆ Fermons les robinets
- ◆ Prenons une courte douche plutôt qu'un bain
- ◆ Réparons les fuites de chasses d'eau
- ◆ Ne jetons pas les produits chimiques ou médicaments dans l'évier
- ◆ Recueillons l'eau de pluie pour arroser.

Article paru dans **Ouest-France**,
mercredi 22 mars 2006.

